

& Ekvilibro:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 448 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Olav Rajdistrozo. Klarigo (*): '14 Ke oni "tiklu la sorton en la faŭko" postulis iam la heroa muzikisto Beethoven, revoluciema ulo tute laŭ mia gusto. (Cezar).>

(#Melodio:

<:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o

)×14)+

(& Strofoj:

'1 /Pianisto /mem a2ktivis,

(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

/klavoj ŝajne /nur pa2sivas.

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj! ; /Iru plankon, dancu kun /granda em'!**)

'2 Tial estas klava sorto sin submeti al la forto.

'3 Sed fieras tamen klavoj, sed ne kiel kvazaŭ-pavoj.

'4 Ĉar sen klavoj kaj piano eĉ ne ludus majstra mano.

'5 Ekvilibro do ekestas kaj la tuta mond' ĉeestas,

'6 se la ĝoj', la di-fajrero, jam ekdancas do sur Tero.

'7 Spite al la maljusteco ĉio estas, ĉiu, peco

'8 de la kosmo kaj de Ter'. Hom', fieru, sed kun deco!

'9 Estu batalant' ĝislaste. Ne subiĝu kaj eĉ haste.

'10 Klavo iĝis – pro rezisto – la partner' de l' pianisto.

'11 Ĝoju homo, ke vi vivas, ke vi sanas kaj kreivas,

'12 ĉagreniĝu ne pri riĉo, tio estus superstiĉo.

'13 Hom' ne povas manĝi monon, tial pluan do admonon:

'14 Amu, kreu, ĝis la morto, tiklu en la faŭk' de l' sorto*.)